

LUCIEN BOURGOIS


"Venas proverbos el popolo la cerbo"
(L.L. ZAMENHOF)

Redaktoro de NORDA GAZETO

PROVERBARO FRANCA - ESPERANTA

KUN ALDONO:

ESPRIMOJ SANKCIITAJ DE L'UZADO



Omaĝe al mia amiko René CURNELLE

Cercle amical espérantiste - Laŭte!
FR-47470 BEAUVILLE
2005

De la sama aŭtoro ĉe la sama eldonanto:

Esprimaro Franca-Esperanta + Suplemento, 292 paĝoj A5

Laŭ la fluo de l' interparolo + Suplemento, 172 paĝoj A6

LUCIEN BOURGOIS

"Venas proverbio el popola la cerbo"
(L.L. ZAMENHOF)



Redaktoro de NORDA GAZETO

PROVERBARO FRANCA - ESPERANTA

KUN ALDONO:

ESPRIMOJ SANKCIITAJ DE L'UZADO

Kiam kato promenas,
la musoj festenas.



Cercle amical espérantiste - Laütel

FR-47470 BEAUVILLE

2005

KVARA ELDONO

Teksto reviziita kaj kompletigita de la aŭtoro


Parizo, la 16/XI/82

Kara Samnordano!

Mi dankis vin pro la sendo de via "Proverbaro franca-E.", sed nun, ĉar mi disponis iom da tempo por legi kaj apreci vian verkon, mi deziras denove danki kaj gratuli vin pro tiu tre utila verko. Ĝi estas la skizo de la verko, kiun ni tiel bezonas, iu "Dictionnaire des Locutions" franca-E-a; kaj eĉ en tiu, mi esperas provizora, vesto, via verketo alportas multon al tiuj, kiuj scios ĝin utiligi. Mi multe ĝuis vian elekton de la francaj proverboj kaj lokucioj, kaj mia soifo ne satiĝis!

Kun miaj kuraĝigaj kaj dank-esprimaj sentoj,

via,



Pasis 10 jaroj de post la unua eldono.

La kuraĝigaj kaj aĝablaj vortoj de nia eminenta leksikologo Gaston WARINGHIEN decidigis min verki la proponitan "Dictionnaire des Locutions" sub la titolo "**Espimaro Franca-Esperanta**". Kunlaboris André GILLES kaj Georges LAGRANGE.

Dume, mi plu kompilis kaj kompletigis ĉefe la unuan parton de la Proverbaro, apartigante disde serio da ekvivalentoj proverbon, kiam ekzistas Esperanta traduko de la franca originalo. Por tio, mi uzis cifersistemon kun indiko "vd" (vidu), kiu resendas al la koncerna serio.

Mi esperas, ke la uzantoj de ĉi tiu libro ŝatos tiun iniciaton.

Noyelles-Godault, la 16-an/1/91

Lucien BOURGOIS

La teoria lernado de lingvo konsistigas nur bazon ; la ĉiutaga praktiko pliriĉigas la akiritajn sciojn.

En la naciaj lingvoj svarmas la parolturnoj, dirmanieroj, idiotismoj, kutimdiroj kaj proverboj. Por regi lingvon, necesas rekte pensi en ĝi, nome uzi esprimojn, kiuj fidele spegulas tiujn aŭtomate uzatajn en la gepatra.

Nia elstara antaŭulo Carlo BOURLET insiste ripetis :

"Il est absolument nécessaire que les espérantistes, dans l'intérêt de la facilité de la lecture rapide et de la conversation, s'habituent, dans le langage courant, à employer les mêmes tournures et les mêmes expressions".

Siaflanke, D-ro ZAMENHOF diris : "Konado de proverboj estas necesa por la perfekta konado de la lingvo".

La okcidenta civilizacio estis multe influata de kristanismo, tial niaj proverboj estis parte ĉerpitaj el la Biblio. Krom kelkaj depruntitaj de fremdaj lingvoj, plej multaj aliaj fontas el la popola sperto kaj herede transdoniĝis, de generacio al generacio.

Por esperantigi la naciajn proverbojn, ZAMENHOF plej ofte uzis rimojn, kiel okazas en la francaj popoldiroj. Tia eleganta prezento reliefigas la esprimatan ideon.

Plej multaj Esperantaj proverboj de ĉi tiu libro fontas el lia "Proverbaro". Mi signis ilin per litero z. X kaj N indikas, ke la koncerna frazo enestas respektive en la Malnova kaj Nova Testamento de la Londona Biblio ;

B = K. BEIN.

La diversaj vortaroj de E. GROSJEAN-MAUPIN multe utilis por la kompilado kaj P.I.V. estis taŭga kontrolilo.

Kiam eble, mi indikis al kiu oni atribuas la enkondukon de la frazo aŭ la fonton. Ĉi tiu precizigo verŝajne interesos vin : "Saĝulo scias ion, sed neniu scias ĉion!".

Ĉi tiu verko konsistigas la unuan volumon. Ĝi konsistas el du partoj : la proverbaro kaj la esprimoj sankciitaj de l' uzado. Por faciligi la trafoliumadon, mi vicigis la francajn frazojn laŭ la rigora aboca ordo. Mi tamen ne konsideris la

difinajn artikolojn : le, la, les. Tial, ekzemple, vi trovos
"(Les) abs ents ont toujours tort" post "A bon vin point
d'enseigne".

La saman alfabetan sistemon uzas francaj vortaristoj.

Mi esperas, ke la enhavo de ĉi tiu helpilo utilos al ties
legantoj kaj ebligos al ili pli facile esprimi sin en Espe-
ranto.

Se tiel okazos, mi estos taŭge plenuminta mian taskon.

Noyelles-Godault
La 16-an de aprilo 1981
Lucien BOURGOIS

Proverbo estas sperto, proverbo estas averto^Z

UNUA PARTO

PROVERBARO


- 1 **A beau mentir qui vient de loin** (Aristotelo)
Ĉio transmara estas ĉarma kaj kara^Z
En landoj transmaraj estas oraj arbaroj^Z
Pri lando malproksima estas bone mensogi^Z
- 2 **A bon chat, bon rat**
Taŭga bato, taŭga rebato^Z - vd 48
- 3 **Abondance de biens ne nuit pas**
De pli da suko ne malboniĝas la kuko^Z
Ne ĝemas la poŝo, se premas ĝin groŝo
Ne ploras poŝo pro troa groŝo
Spesmilo superflua poŝon ne ŝiras^Z /truas^Z
Tro da enspezo ne estas tro da pezo^Z
- 4 **A bon vin point d'enseigne**
Por vino bona ŝildo nebezona
- 5 **Les absents ont toujours tort**
La forestanto ĉiam estas malprava^Z
Por malfrua gasto restas nur ostoj^Z
- 6 **A chacun sa chacune**
A chaque pot son couvercle
Ĉiu "li" havas sian "ŝi"^Z
Kia la birdo, tia la kaĝo^Z

- 7 **A chacun son goût** vd 339
 Ĉiu havas sian (propran) guston^Z
 En ĉiu brusto estas ĝia gusto^Z
 Kiom da homoj, tiom da gustoj^Z
- 8 **A chacun son métier ... et les vaches seront bien gardées**
 (Floriano)
 Ĉiu klopodu en sia metio, tiam al la urbo mankos nenio^Z
 Restu tajloro ĉe via laboro^Z - vd 290
- 9 **A chaque jour suffit sa peine** (Evangelio) / **son mal**
 Sufiĉa por la tago estas ĝia propra malbono
- 10 **A chemin battu il ne croît point d'herbe**
 Vojon batitan herbo ne kovras^Z
- 11 **A cheval donné on ne regarde pas la bride/le mors/les dents**
 Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras^Z
- 12 **A coeur vaillant, rien d'impossible** (Jacques Coeur)
 Al bravulo nenio maleblas
 Kuraĝo ĉion atingas^Z
- 13 **Les affaires sont les affaires**
Business is business
 Negoco estas negoco - vd 106
- 14 **Aide-toi, le Ciel t'aidera** (Lafonteno)
 Dion fidu, sed senfare ne sidu^Z
 Helpu al vi, vin helpas Di' Faru vian aferon, Dio zorgos ceteron^Z
 Kiu al si helpas, al tiu Dio helpas^Z
 Preĝon faru, sed farunon preparu^Z
 Preĝu kore kaj laboru fervore^Z
- 15 **L'air ne fait pas la chanson**
 Aspekto ne indas respekton
 Ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincereco^Z
 Valoras ne la vesto, valoras la enesto - vd 128
- 16 **A l'hôte on mesure la chère**
 Kia gasto, tia gastigo
 Kia regalato, tia regalado^Z
 Kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas^Z
 Se oni amas la gaston, oni zorgas la paston^Z

- 17 **A l'impossible nul n'est tenu**
Neebleco estas plej forta senkulpigo
- 18 **A l'oeuvre on connaît l'artisan (Lafonteno) / l'ouvrier**
A l'ouvrage connaît-on l'ouvrier
Faro farinton rekomendas^z
Kia estas via laboro, tia estas via valoro^z
Koniĝas majstro laŭ sia verko^z
- 19 **Les alouettes ne vous tombent pas toutes rôties dans le bec** · vd 236
Rostita kolombeto ne flugas al buŝeto^z
En la buŝon de dormanta kato ne venas muso
Fiŝo ne iras, sed hoko ĝin tiras^z
Ne gutas mielo el la ĉielo^z
Ne venos rato mem al kato^z
Pano buŝon ne serĉas^z
- 20 **A malin malin et demi**
Trafis pugno pugnon^z - vd 33
- 21 **Les amis de nos amis sont nos amis**
Amiko de amiko estas ankaŭ amiko^z
- 22 **L'amitié n'a pas de prix**
Pli gravas amiko ol mona fabriko
- 23 **L'amour est aveugle (Platono)**
Amo estas blinda
Eĉ monstron admiras, kiu ame deliras^z
Ne bela estas amata, sed amata estas bela^z
Ne bela estas kara, sed kara estas bela^z
- 24 **A père avare, enfant (fils) prodigue**
A femme avare, galant escroc
Patroj avaras, infanoj malŝparas^z
Avarulo avaras, heredantoj malŝparas^z
- 25 **A petite cause, grands effets**
Petit aiguillon pique un gros âne (Provenco)
Une petite mouche fait péter un bel âne
Ofte de kaŭzo senenhava venas efiko plej grava^z
De malgranda kandelo forbrulis granda kastelo^z
Pro korta preno perdiĝis bieno^z
Pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela^z - vd 124

- 26 **Les apparences sont trompeuses** (S-ino de Sévigné)
Ŝajno trompas^z- vd 164
- 27 **L'appétit vient en mangeant** (Rabelezo)
La apetito akriĝados dum la manĝado^z
Dum la manĝado venas apetito^z
- 28 **Après la pluie, le beau temps**
Post vetero malbela lumassuno plej bela^z
Ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero^z
Post sufero venas prospero^z
- 29 **A quelque chose malheur est bon**
Ĉiu vento blovas profiton al iu
Eĉ malfeliĉo havas (foje) utilon
Eĉ plej granda malbono al bono kondukas^z
En ĉiu malbono estas iom da bono^z
- 30 **A qui sait comprendre, peu de mots suffisent**
Por saĝul' eĉ duonvorto klaras kiel plenraporto
Por saĝulo sufiĉas aludo^z
Saĝa kapo duonvorton komprenas^z
- 31 **A qui se lève matin, Dieu aide et prête main**
Horo matena estas horo bona^z
Kiu frue levigâs facile riĉigâs^z
Matena horo estas plena de oro^z
- 32 **Les arbres cachent la forêt**
En arbaro sidas kaj arbojn ne vidas^z
Pro multe da arboj li arbaron ne vidas^z
- 33 **A renard, renard et demi**
Eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas^z - vd 20
- 34 **L'argent appelle l'argent**
Les rivières retournent à la mer
Qui chapon mange, chapon lui vient
Mono kuras al mono^z
Mono monon naskas^z- vd 105
- 35 **L'argent n'a pas d'odeur** (Vespaziano)
Mono odoron ne havas, sian devenon ne diras^z

- 36 L'argent ne fait pas le bonheur**
 Kontraŭ malfeliĉo ne helpas eĉ riĉo
 Mono feliĉon ne donas
 Ne ĉiam feliĉo amikas kun riĉo
 Ne naskiĝu riĉa, naskiĝu feliĉa^z
 La riĉaĵoj ne liveras la feliĉon
 Riĉeco ne estas feliĉeco
 Riĉo feliĉon ne donas
- 37 A tout mal il existe un remède**
 Kontraŭ ĉiu tedo ekzistas rimedo^z
 Kontraŭ ĉiu malfacilo ekzistas konsilo^z
- 38 A tout péché miséricorde**
 Al ĉiu peko pardona kompatato
- 39 A tout seigneur tout honneur**
 Al ĉiu sinjoro estu lia honoro^z
 Al grandaj sinjoroj grandaj honoroj^z
 Al ĉiu sanktulo apartan kandelon^z
- 40 Au pays (dans le royaume) des aveugles, les borgnes sont rois**
 Inter la blinduloj reĝas la strabuloj^z
- 41 Au pays des promesses, on y meurt de faim**
 De atendo kaj espero pereis multaj sur la tero^z
 Espero panon ne donas^z
 Fidanta al vorto atendas ĝis morto^z
 Promeso ne satigas^z
 Promeso rimiĝas kun forgeso^z
- 42 Autant de têtes, autant d'avis (Lafonteno)**
Quot capita, tot sensus
 En ĉiu kranio estas sia opinio^z
 En ĉiu kranio regas aparta opinio^z
 Kiom da kapoj, tiom da opinioj^z
 Kiom da juĝantoj, tiom da juĝoj^z
- 43 Autres temps, autres mœurs (Pindaro)**
 Aliaj tempoj, aliaj moroj^z
- 44 Aux grands maux les grands remèdes**
 Grandaj malbonoj - grandaj rimedoj^z



**REGLANDO
BLINDIO**

Inter la blinduloj reĝas la strabuloj

- 45 **Aux innocents les mains pleines**
Malsaĝulon favoras feliĉo^Z
- 46 **Avec des "si" et des "mais" (Avec un si) on mettrait Paris en bouteille**
Si Paris était plus petit, on le mettrait dans un baril
Se ne estus "se" kaj "tamen", mi al ĉio dirus amen^Z
Se ne la "se" malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa^Z
Se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus^Z- vd 324
- 47 **Avec sa langue on va partout**
Peto kaj demando kondukas tra l'tuta lando^Z
Plej bona gvidilo estas la lango^Z
- 48 **A voleur, voleur et demi**
Ŝteli ĉe ŝtelisto estas malfacile^Z
Ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li tie ne profitas^Z - vd 2
- 49 **La barbe ne fait pas le philosophe (Plutarko)**
Griza barbo saĝon ne atestas^Z- vd 231
- 50 **La beauté est éphémère**
Beleco hodiaŭ estas, morgaŭ ne restas^Z
- 51 **Les beaux (Les grands) esprits se rencontrent (Voltero)**
La grandaj spiritoj ja simpatias
- 52 **Les belles paroles ne font pas bouillir la marmite**
Se vi senfine parolos, de ĝi la potoj ne bolos^Z
Rezonado kaj filozofado panon ne donas^Z
Malsatulon la fabloj ne nutros^Z
- 53 **Bien commencé, à moitié fait**
Komenco bona, laboro duona^Z
Plej granda potenco kuŝas en komenco^Z
- 54 **Bien faire et laisser dire/laisser braire**
Lasu la homojn paroli kaj bone faru
- 55 **Bienheureux les pauvres en esprit, car le royaume des cieux est à eux (Evangelio)**
Beati pauperes spiritu...
Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo
Kiu saĝon ne havas, Dio lin savas^Z

56 Bien mal acquis ne profite point (Lafonteno)/ne profite jamais

D'où vient l'agneau, là retourne sa peau
Ce qui vient du diable retourne au diable
Neleĝe (peke) akirita ne estas profita^z
Maljustaj trezoroj ne donas utilon
De fremda poŝo ŝirigās la poŝo^z
Kiu rabe eliras, ofte nuda revenas^z

57 Bon à tout, bon à rien
Kio servas por ĉio, taŭgas por nenio^z

58 Bon chien chasse de race
Hundo bonrasa estas bona por ĉaso^z
Plej juna katido musojn jam pelas^z

59 Bonne renommée vaut mieux que ceinture dorée
Bon renom vaut même un héritage
Bona gloro pli valoras ol oro^z
Pli bona estas virto sen oro, ol oro sen honoro^z
Pli bona ĉifona vesto, ol riĉeco en malhonesteco^z
Neniom da oro, sed bona gloro^z

60 Bon sang ne peut (ne saurait) mentir
Bon fruit vient de bonne semence
De noble plante noble fruit
Sango ne silentas, sian sangon ĝi sentas^z
Bona sango sin ne malkonfesas
La sango ne mensogas

61 Les bons comptes font les bons amis
Bonaj kalkuloj, bonaj kunuloj^z
Ĝusta kalkulado forigas disputon^z
Ju pli precizaj la kalkuloj, des pli fortika la amikeco^z
Amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu^z
Ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate^z

62 Calomniez, calomniez, il en restera toujours quelque chose (Beaumarchais)
Se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas^z
Se kalumnio ne brulas, ĝi almenaŭ makulas^z

- 63 **La caque sent toujours le hareng**
Le mortier sent toujours les aux
Mangeant du foin vous sentez l'âne
 Haringujo ĉiam malbonodoras haringe
 Al farun' malbonspeca ne helpas la spico^Z
 Difekton de naturo ne kovros la spico^Z
 Malbona edukito neniam bonedukiĝos
 Nigran kornikon sapo ne blankigos^Z
 Plej kuirita kampulo ĉiam restos krudulo^Z
- 64 **Ce n'est pas toujours celui qui sème qui récolte**
 Printempo semas, aŭtuno rikoltas.^Z
- 65 **Ce n'est pas tout de promettre, il faut tenir**
 Sub seruro promesojn tenu, sed doninte ne reprenu^Z
- 66 **Ce que femme veut, Dieu le veut**
 Kion virino volas, Dio volas
 Kion volas ino, tion volas Dio
- 67 **Ce sont les mauvaises roues qui grincent le plus**
Ce sont les tonneaux vides qui font le plus de bruit
 Rado malbona knaras plej multe^Z
 Barelo malplena sonas plej laŭte^Z
 Kiu nenion valoras, plej multe sin gloras^Z
- 68 **C'est au fruit que l'on reconnaît (connaît) l'arbre**
 (Evangelio)
On reconnaît l'arbre à son fruit/à ses fruits
 Kia arbo, tia frukto
 Laŭ la frukto oni arbon ekkonas^Z
- 69 **C'est au pied du mur qu'on voit le mâçon**
 Ĉe l'brikoj kaj mortero montriĝas la majstro
- 70 **C'est dans le besoin que l'on reconnaît ses vrais amis**
Au besoin on connaît l'ami
C'est dans le malheur qu'on connaît ses amis
 Amikon montras malfeliĉo^Z
- 71 **C'est en forgeant qu'on devient forgeron**
 Ripetado estas bona lernado^Z
 Kiu ripetas abunde, lernas plej funde^Z

- 72 **C'est quand le mal est fait que la sagesse arrive**
 Post domaĝo venas saĝo^Z
- 73 **Ceux qui viennent tard à table ne trouvent plus que des os**
 73 bis : Chacun est maître de son destin
 Ĉiu forĝas sian sorton
Tarde venientibus ossa
 Kiu venis post la manĝo restas sen manĝo^Z
 Por malfrua gasto restas nur ostoj^Z
- 74 **Chacun fait son lit comme il veut se coucher**
 Ĉiu sin direktas, kiel la kap' al li diktas^Z
 Ĉiu vivas laŭ sia prudento kaj sento^Z
- 75 **Chacun pour soi, Dieu pour tous**
 Ĉiu por si - por ĉiuj Di'^Z
- 76 **Chacun prêche pour sa paroisse/pour son saint**
Chacun tire l'eau à son moulin
 Ĉiu vulpo sian voston laŭdas^Z:
 Ĥio mia, tio bona^Z
- 77 **Chacun recueillera ce qu'il a semé**
Comme vous sèmerez, vous récolterez (Galato)
 Kie la semo, tie la rikolto^Z
 Kion vi semas, tion vi rikoltos^Z
- 78 **Chaque chose a son temps (Ecclès)**
 Por ĉiu faro estas horo^Z
 Por ĉio estas sezono^x
 Kio taŭgas por somero ne taŭgas por vintro^Z
- 79 **Charbonnier est maître chez soi/dans sa maison**
 En sia hejmo estras karbisto^Z
 En la propra sia domo, ĉiu estas granda homo^Z
 En ĉiu nesto (en sia nesto) regas ĉiu besto
 En sia korto ĉiu kok' estas forta^Z
- 80 **Charité bien ordonnée commence par soi-même**
 Amiko plej kara, sed mi mem estas pli kara^Z
 Ĉiu mano al si altiras^Z
 Ĉiu por si mem estas la plej kara^Z
 Hodiaŭ al mi, morgaŭ al vi^Z
 Unue la miaj, poste la aliaj



Hundo bojas, homo vojas

- 81 **Chat échaudé craint l'eau froide**
 Brogita eĉ sur akvon blovas^Z
 Kiun brogis varmega lakto, tiu blovas sur malvarman
 Korniko vundita propran voston timas^Z
- 82 **Le chat parti, les souris dansent**
Quand le chat n'est pas là, les souris dansent
 Kiam kato promenas, la musoj festenas^Z
 Se foriras la katoj, festenas la ratoj^Z- vd 381
- 83 **Chien qui aboie ne mord pas**
Tous les chiens qui aboient ne mordent pas
Il ne pleut pas quand il tonne
 Bojanta hundo ne mordas^Z
 Kiu bojas, ne mordas^Z
 Ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta^Z
 Ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan^Z
 Koko krias fiere sed ne dangere^Z
 Ne ĉio batas, kio tondras^Z
- 84 **Les chiens aboient, la caravane passe**
 Hundo bojas, homo vojas^Z
 Hundo bojas la vojon, vento portas la bojon^Z
 Hundo bojas, pasanto vojas^Z
 Envia moko sukceson ne detruas^Z
- 85 **Chose promise, chose due**
 Promeso estas ŝuldo
- 86 **Clef d'or ouvre toutes les portes**
Marteau d'argent ouvre porte de fer (Monako)
 Ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas^Z
 Ora ŝlosilo ĉion malfermas^Z
 Spesmilo la vojon trabatas^Z- vd 318
- 87 **La colère est mauvaise conseillère**
 Kolero montras malsaĝulon^Z
 Kolero estas miskonsilo
- 88 **Comme on connaît les saints, on les honore**
 Kiel oni vin taksas, tiel oni vin regalas^Z
 Kiel la merito, tiel la honoro



Êe botisto
la ŝuo ĉiam estas kun truo...

- 89 **Comme on fait son lit, on se couche**
 Kiel oni sternas, tiel oni dormas^z
 Kian vi litaĵon faros, tian dormon vi preparos
 Ĉiu manĝas, kiel li aranĝas^z
 Kion vi pripenas, tio al vi venas^z
- 90 **La confiance appelle la confiance**
 Konfido naskas konfidon^z
- 91 **Les conseillers ne sont pas les payeurs**
 Kiu konsilas kaj rezonas, tiu helpon ne donas^z
 Oni konsilas kaj konsolas, sed helpi ne volas^z
 Sonorilo vokas al preĝejo kaj mem neniam eniras^z
- 92 **Contentement passe richesse**
 Kontenteco estas pli bona ol riĉeco^z
- 93 **Les cordonniers sont toujours les plus mal chaussés**
 Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo^z
- 94 **La critique est aisée, et l'art est difficile (Destouches)**
 Kritiki estas facile, fari malfacile^z
 Pli facile estas regi, ol agi^z
- 95 **Dans le doute, abstiens-toi!**
 Kiu dubas, tiu sin detenu!
 Se vi dubas, ne agu!
- 96 **Du cuir d'autrui, on fait large courroie**
 El fremda lego oni tranĉas large^z - vd 230
- 97 **De deux maux, il faut choisir le moindre (Sokrato)**
Minima de malis
 El du malbonoj, pli malgrandan elektu^z
- 98 **De la main à la bouche se perd souvent la soupe**
 De la mano ĝis lipoj la sup' elverŝiĝis^z
 Inter la mano ĝis la buŝo ofte disverŝiĝis la supo^z
 - vd 187 + 378
- 99 **Dépendez un pendu et il vous pendra - vd 115**
- 100 **Des goûts et des couleurs il ne faut pas disputer/on ne dispute point / on ne discute pas**
De gustibus et coloribus non disputandum
 Pri gustoj oni disputi ne devas^z

- 101 **Dieu fait bien ce qu'il fait**
Dio ĝuste faras, neniam eraras ^z
- 102 **Dieu me garde de mes amis! Quand à mes ennemis,
je m'en charge (Voltero)**
Gardu min Dio kontraŭ amikoj, kontraŭ malamikoj
mi gardos min mem ^z
- 103 **Dis-moi qui tu hantes (qui tu fréquentes), je te dirai
qui tu es**
Kun kiu vi festas, tia vi estas ^z - vd 307
- 104 **Donner un oeuf pour avoir un boeuf
Donner un pois pour avoir une fève**
Doni ovon, por ricevi bovon ^z
Fordoni paseron, por ricevi anseron ^z
- 105 **L'eau va toujours à la rivière
La pierre va toujours au tas/ tombe toujours sur le tas**
Riveroj fluas al rivero ^z - vd 34
- 106 **En affaires, on ne fait pas de sentiments**
Amikeco aparte, afero aparte ^z
Amikeco aparte, ofico aparte ^z
Ne ekzistas en komerco amikeco nek ŝerco ^z
Negocaj aferoj estas severaj ^z
Ne sufiĉas ploro al kreditoro ^z - vd 13
- 107 **En avril, ne te découvre pas d'un fil; en mai, fais ce
qu'il te plaît**
En avril, n'ôte pas un fil; en mai, fais ce qu'il te plaît
Au mois d'avril, ne t'allège pas d'un fil (dep. Hérault)
Aprila vetero - trompa aero ^z
Komenco Aprila - trompo facila ^z
- 108 **(Le chemin de) l'enfer est pavé de bonnes intentions**
Per promesoj estas pavimita la infero ^z
Plena estas la infero de promesitaj aferoj ^z
- 109 **Entre dire et faire, il y a un monde** vd 126
Du dire au fait il y a grand (long) trait
De parolo ĝis faro estas tre malproksime ^z
Inter diro kaj faro estas maro ^z
Inter faro kaj rakonto staras meze granda monto ^z
Paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj ^z
Rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj ^z

- 110 **L'exception confirme la règle**
 Esceptoj konfirmas la regulon
 La regulo allasas kelkajn esceptojn - vd 176
- 111 **L'excès en tout est un défaut**
L'excès en tout nuit
 Ĉio supermezura estas terura ^z
 De tro da pano venas malsano ^z
 Por ĉiu plezuro devas esti mezuro ^z
 Troa festeno estas veneno ^z
 Tro saltas la rato, ĝin kaptas la kato ^z
- 112 **La façon de donner vaut mieux que ce qu'on donne** (Kornelio)
 La maniero de donado pli valoras ol la donaĵo mem
 La maniero, kiel oni donas, valoras pli ol tio, kion oni dona
 Pli bona estas vorto afabla ol kuko agrabla ^z
 Nur pano kun fromaĝo, sed afabla vizaĝo ^z
- 113 **La faim chasse le loup hors du bois**
 Se malsato turmentas, lupoj timon ne sentas ^z
- 114 **Fais ce que dois, advienne que pourra**
 Faru vian aferon, Dio zorgos ceteron ^z
- 115 **Fais du bien à un baudet, il te pètera au nez/ il te
 remerciera par ses crottes**
Fais du bien à un âne, il vous paiera d'un coup de pied
Faites du bien à un vilain, il vous fera caca dans la main
Graissez les bottes d'un vilain, il dira qu'on les lui brûle
 Nutru korvon, ĝi elpikos al vi okulojn
 Vi varmigos serpenton, ĝi al vi enpikos la denton ^z
 Donu al krudulo plezuron, li ne scios mezuron ^z
 Se vi krudulon iom karesos, li al si ĉion permesos ^z
 Se vi krudulon salutos, li vin tutan englutos ^z
 Ŝmiru la botojn de krudulo, li diras, ke oni ilin brul-
 igas - vd 99
- 116 **Faites aux autres ce que vous voudriez qu'on vous fît**
 (Evangelio)
 Agu kun aliaj kiel vi volas, ke oni agu kun vi ^z
 Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras, ke aliaj agu kun vi ^z
 Agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu
 kun vi ^z - vd 217

(à demi)

- 117 **Faute avouée est à moitié pardonnée** - vd 262
- 118 **Faute de grives, on mange des merles** - vd 153
- 119 **Faute de parler, on meurt sans confession** - vd 299
- 120 **Feu de paille ne dure guère**
Tro akra fajro estas sen daŭro^z
- 121 **La fin justifie les moyens** (Ignaco de Lojola)
La celo pravigas la rimedojn
- 122 **La force prime le droit** (Habakuko)
Kiam forto ordonas, leĝo pardonas^z
Kie regas la forto, tie rajto silentas^z
Kiu forton ne havas ĉiam malpravas^z
Kiu havas forton, havas rajton^z
Kontraŭ forta mano la leĝo estas vana^z - vd 316
- 123 **La fortune sourit aux audacieux**
Audaces fortuna juvat
Al tiu la sorto ridas, kiu multe riskas
- 124 **Goutte à goutte l'eau creuse la pierre**
La goutte d'eau finit par creuser le roc
De guto post guto disfalas granito^z
Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la
monton granitan^z
Senĉesa guto eĉ ŝtonon traboras^z - vd 25
- 125 **Les grandes douleurs sont muettes** (Seneko)
Ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro^z
Vundo sekreta doloras plej multe^z
- 126 **Les grands diseurs ne sont pas les grands faiseurs**
Granda parolisto estas duba faristo^z vd 109
Granda parolisto, malgranda faristo^z
Kiu multe parolas, ne multe faras^z
- 127 **L'habit fait le moine**
Vesto homon prezentas^z
- 128 **L'habit ne fait pas le moine** (Rabelezo)
Kapuĉo monaĥon ne faras^z - vd 164

- 129 **L'habitude est une seconde nature**
 Kutimo estas dua naturo^z
 Kelktempa ĉeso ne estas forgeso^z
- 130 **Hâte-toi lentement (Chilon)**
Festine lente (Aŭgusto)
 Rapidu malrapide - vd 147
- 131 **Heureux au jeu, malheureux en amour/malheureux en femmes**
 Feliĉa ĉe monludo, malfeliĉa ĉe amo
- 132 **L'homme propose, Dieu dispose**
 Homo proponas, Dio disponas^z
- 133 **L'hôte et la pluie après trois jours ennuit**
 Gasto, kiel fiŝo, baldaŭ fariĝas malfreŝa^z
- 134 **Il est bon de parler et mieux de se taire (Lafonteno)**
 Sciu elokventi, sciu ankaŭ silenti^z - vd 255
- 135 **Il est bon de pêcher en eau trouble**
 En akvo malklara oni fiŝkaptas facile^z
- 136 **Il est plus facile de plier un jeune plant que de redresser un arbre**
 Fleksu arbon dum ĝia juneco^z
- 137 **Il faut avoir la reconnaissance du ventre**
 Kies panon oni manĝas, ties agojn oni laŭdas
 Kies gasto mi estas, ties feston mi festas^z
- 138 **Il faut battre le fer quand il est chaud** vd 154
 Forĝu feron dum ĝi estas varmega^z
 Ŝiru rozojn en somero, ĉar vintre ili ne estos^z
- 139 **Il faut être pris pour être appris**
 Post damaĝo venas saĝo^z
 Saĝa hundo post la vundo^z
 Sperto saĝon akriĝas^z - vd 369
- 140 **Il faut faire contre mauvaise fortune bon coeur**
 Faru mienon fieran al ludo mizera^z
 Kaŝu malbenon kaj faru bonan mienon^z
 Kontraŭ doloro helpas bona humoro^z

- 141 **Il faut faire de nécessité vertu**
 El la mizero (neceseco) oni devas fari virton^z
 Se devigas neceso faru kun kareso^z
- 142 **Il faut laver son linge sale en famille**
 Tolaĵon malpuran lavu en la domo^z
 Balaĵon el korto eksteren ne elportu^z
 Ne kotas besto (birdo) en sia nesto^z
- 143 **Il faut manger pour vivre** Un sac vide ne peut pas tenir debout
 Sako malplena sin rekte ne tenas^z
- 144 **Il faut manger pour vivre et non vivre pour manger**
 (Sokrato)
 Oni devas manĝi por vivi, sed ne vivi por manĝi
- 145 **Il faut que jeunesse se passe**
 Sango bolas, juneco petolas^z
- 146 **Il faut qu'un menteur ait bonne mémoire**
 Kiu volas mensogi, devas bone memori^z
 Mensoganto devas havi bonan memoron^z
 Mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas^z
 vd 204
- 147 **Il faut réfléchir avant d'agir**
 Antaŭe pripensu, poste agu^z
 Antaŭe intencu kaj poste komencu^z
 Pripensu malrapide kaj agu decide^z
 Dek fojojn mezuru, unu fojon detranĉu^z
 Longa konsidero savas de sufero^z - vd 130
- 148 **Il faut réfléchir avant de parler**
 Antaŭ la lango laboru la cerbo^z
- 149 **Il faut rendre à César ce qui appartient à César, et à Dieu ce qui est à Dieu** (Evangelio)
Redde Caesari quae sunt Caesaris, et quae sunt Dei Deo
 Redonu al Cezaro la proprajon de Cezaro kaj al Dio la proprajon de Dio
- 150 **Il faut saisir l'occasion par les cheveux** vd 368
 Kiu okazon forŝovas, ĝin jam ne retrovas^z
 Okazon kaptu ĉe l'kapo, ĉar la vosto estas glita^z

- Se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo^z
 Kiu ne akiras kiam li povas, tiu poste deziras, sed ne
 retrovas^z
 Kiu pasis preter okazo, neniam retrovos^z
- 151 Il faut savoir hurler avec les loups**
 Inter lupoj krii lupe^z
 Inter generaloj parolu pri bataloj^z
 Inter kornikoj ne konvenas predikoj^z
 En infero loĝante, kun diabloj ne disputu^z
- 152 Il faut savoir ménager la chèvre et le chou**
 Al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu^z
 Al Dio servu, diablon rezervu^z
 Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu^z
 Amikon ŝatu, malamikon ne batu^z
 Se vi povas profitu, sed aliajn ne incitu^z
- 153 Il faut savoir se contenter de peu**
Faute de grives, on mange des merles
 Se forestas la suno, sufiĉos la luno^z
 Se mankas ĉevalo, konvenas azeno^z
 Vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu la sunon^z - vd 209
- 154 Il ne faut jamais remettre à demain ce qu'on peut faire**
le jour même vd 138
Ne remets pas à demain ce que tu peux faire aujourd'hui
 (Aleksandro la Granda)
 Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ^z
 Fareblan hodiaŭ ĝis morgaŭ ne prokrastu
 Faru hodiaŭ kion vi povas - morgaŭ vi eble okazon ne
 trovos^z
- 155 Il ne faut jurer de rien**
 Pri nenio oni povas ĵuri^z
- 156 Il ne faut pas courir (chasser) deux lièvres à la fois**
On ne court pas deux lièvres à la fois (Lafonteno)
Qui court deux lièvres à la fois n'en prend aucun
 (Karlo Orleana)
 Kiu ĉasas du leporojn kaptas neniun^z
 Kiu du leporojn pafas, neniun trafas^z
 Per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras^z - vd 310

*Kiu du leporojn pafas,
neniun trafas*



- 157 **Il ne faut pas enseigner aux poissons à nager**
 Al la fiŝo ne instruu naĝarton^z
 Fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo^z - vd 235
- 158 **Il ne faut pas jouer avec le feu**
 Kiu timas bestaron, ne iru arbaron^z
 Oni ne povas marŝi sur ardantaj karboj ne bruligante
 siajn piedojn^z
- 159 **Il ne faut pas lâcher (laisser) la proie pour l'ombre**
 (Lafonteno)
Un moineau dans la main vaut mieux qu'une grue qui vole
Moineau en main vaut mieux que perdrix qui vole
 vd 360
 Pasero kaptita estas pli bona ol aglo kaptota^z
- 160 **Il ne faut pas mélanger les torchons et les serviettes**
Il ne faut pas mêler les torchons et les serviettes
 Apartigu la ŝafojn disde la kaproj (Evangelio)
- 161 **Il ne faut pas mettre la charrue devant (avant) les boeufs**
 Ne jungu la bovon malantaŭ la plugilon^z
 Ne iru fadeno antaŭ kudrilo^z
162. **Il ne faut pas parler de corde dans la maison d'un pendu**
 En dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu^z
 Sprit' en tempo ne ĝusta estas tre malbongusta^z
- 163 **Il ne faut pas réveiller le chat qui dort**
N'éveillez pas le chat qui dort
 Dormantan hundon ne tuŝu^z
 En abelujon ne blovu^z
 Ne elvoku lupon el la arbaro^z
 Ne veku malfeliĉon, kiam ĝi dormas^z
 Ne voku diablon, ĉar li povas aperi^z
- 164 **Il ne faut pas se fier aux apparences**
Il ne faut pas juger de l'arbre par l'écorce
On ne connaît pas le vin au cercle
 Ne juĝu pri afero laŭ ĝia ekstero^z
 Ŝajnon ne fidu, juĝi ne rapidu^z - vd 128



Ne jungu la bovon
malantaŭ la plugilon



165 Il ne faut pas vendre la peau de l'ours avant de l'avoir tué

Lièvre qui court n'est pas mort

Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon^z
Ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko^z
Ne diru "hop" antaŭ la salto^z
Ne fanfaronu irante, fanfaronu revenante^z
Ne laŭdu la tagon antaŭ vespero^z
Ne moku riveron, ne atinginte la teron^z
Ankoraŭ la gajno ne estas en la mano^z
Ĝi estas ankoraŭ birdo sur la tegmento^z
Ĝi estas ankoraŭ pasero en aero^z
La mangota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero^z

166 Il n'est d'eau plus pure que l'eau courante
Akvo kura, akvo pura^z

167 Il n'est de si belle rose qui ne se flétrisse
Eĉ plej bela rozo iam velkos

168 Il n'est pas de rose sans épines
Ne ekzistas rozoj sen dornoj^z- vd 177

169 Il n'est pire aveugle que celui qui ne veut pas voir
Nur blinda estas tiu, kiu ne volas vidi

170 Il n'est pire eau que l'eau qui dort
Il faut se méfier de l'eau qui dort
Akvon senmovan kovras putraĵo^z
Akvo trankvila estas akvo danĝera^z
Akvo silenta subfosas la bordon^z

171 Il n'est pire sourd que celui qui ne veut point entendre
Neniu estas tiel surda, kiel tiu, kiu ne volas aŭdi

172 Il n'est rien de tel que balai neuf
Nova balailo bone balaas^z- vd 348

173 Il ne suffit pas d'espérer pour prospérer
Per sola espero ne venas prospero

174 Il n'y a pas d'effet sans cause
La pomme ne tombe jamais de l'arbre
Famo ne flugas, se kaŭzo ne estas^z

Ne batas bastono sen persono^z
Ne ekzistas terno sen nazo nek fakto sen bazo^z
Ĉiu "tial" havas sian "kial"^z - vd 175

175 **(Il n'y a) Pas (point) de fumée sans feu**
Il n'est jamais feu sans fumée

Kie fumo troviĝas, tie fajro troviĝas^z
Ne ekzistas fumo sen brulo^z/fajro^z
Se brulas nenio, fumo ne iras^z - vd 174

176 **(Il n'y a) Pas de règle sans exception**
Ne ekzistas regulo sen escepto^z - vd 110

177 **Il n'y a pas de rose sans épines**
Nulle rose sans épines - vd 168

178 **Il n'y a que celui qui ne fait rien qui ne se trompe pas**
Il n'y a que ceux qui ne font rien qui ne se trompent
jamais vd 264
Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras^z

179 **Il n'y a que la vérité qui blesse/qui offense**
Kie jukas, tie ni gratas^z

180 **Il n'y a que le premier pas (la première pinte) qui coûte**
Unua paŝo iron direktas^z

181 **Il n'y a que les montagnes qui ne se rencontrent jamais**
Ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas^z

182 **Il n'y a que l'intention qui compte**
Nur la intenco gravas

183 **Il vaut mieux avoir affaire (s'adresser) à Dieu qu'à**
ses saints

Preĝu al la Eternulo, ne al Lia sanktulo^z
Se Dio ne volas, sanktulo ne povas/ ne helpas^z

184 **Il vaut mieux donner que recevoir (Ago de l'apostoloj)**
Pli feliĉa estas donanto ol prenanto^z

185 **Il vaut mieux tenir que courir**
Ne fidu heredon, fidu posedon^z
Saĝa tenas aferon, malsaĝa esperon^z - vd 360

- 186 **Il vaut mieux un petit chez soi qu'un grand chez les autres**
 vd 320
 Ĉie estas varme, sed hejme estas ĉarme^z
- 187 **Il y a loin de la coupe aux lèvres**
Il arrive beaucoup de choses entre la bouche et le verre
 De la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco^z
 Inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi^z - vd 98
- 188 **Il y a un début à tout**
 Ĉio havas komencon^z
 Kiu ne estis kaporalo, ne estos generalo^z
 Sen speso unua ne ekzistas dua^z
- 189 **Il ya un dieu pour les ivrognes**
 Por ebriulo ne ekzistas danĝero^z
- 190 **Jeux de mains, jeux de vilains**
 Troa petolo, danĝera al kolo^z
 Petolado sen mezuro ne kondukas al plezuro^z
- 191 **Les jours se suivent et ne se ressemblent pas**
Les jours suivent pas à pas, mais ils ne se ressemblent pas
 Tago tagon sekvas sed ne similas^z
 Hodiaŭ festene, morgaŭ malplene^z
 Hodiaŭ forto, morgaŭ morto^z
- 192 **(Là) où il n'y a rien, le diable perd ses droits**
 De nehavanto eĉ reĝo nenion ricevos^z
 El malplena telero vane ĉerpas kulero^z
 Kontraŭ neesto ne helpas protesto^z
 Kontraŭ nehavo eĉ juĝo silentas^z
- 193 **Loin des yeux, loin du coeur**
 For de l'okuloj, for de la koro^z
- 194 **Le loup mourra dans sa peau**
Dans sa peau mourra le loup/ le renard
 Kiu lupo naskiĝis, vulpo ne fariĝos^z
 Kiu naskiĝis sciuro, ne fariĝos vulturo^z
- 195 **Les loups ne se mangent pas entre eux**
 Lupo lupon ne manĝas^z
 Korvo al korvo okulon ne pikas^z
 Ŝtelisto ŝteliston ne perfidas^z

- 196 **Mal d'autrui ne touche guère/n'est que songe**
 De fremda dento ni doloron ne sentas^z
 Fremda mizero ne estas sufero^z
 Fremda mizero, ridinda afero^z
 Sur êeval' de najbaro la ŝargô ne pezas^z
- 197 **Le malheur des uns fait le bonheur des autres**
 Unu floras, alia ploras^z
 Por malsanulo forto, por kokido morto^z
 Por unu - festeno, por alia - ĉagreno^z
- 198 **Les malheureux n'ont pas d'amis**
 Malriĉuloj amikojn ne havas - vd 199
- 199 **Les malheureux n'ont point de parents**
 Malriĉulo parencojn ne havas^z - vd 198
- 200 **(Le) malheur ne dure pas toujours**
 Nek ĝojo, nek malĝojo daŭras eterne^z
- 201 **Le malheur vient sans qu'on l'invite**
Les malheurs viennent sans qu'on les appelle
Il ne faut pas aller au devant du malheur
 Malfeliĉo inviton ne atendas^z
 Malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston - ĝi tuj venas^z
 Malfeliĉo venas sen alvoko^z
 Mizero faras viziton, ne atendente inviton^z
 Venas ĉagreno sen granda peno^z
 Ne voku diablon, ĉar li povas aperi^z
- 202 **La mauvaise graine, ça ne meurt pas**
 Malbona herbo froston ne timas^z
 Urtikon frosto ne difektas^z
 Malbonulon diablo ne prenas^z - vd 203
- 203 **Mauvaise graine croît toujours**
 Semo malutila frue grandiĝas
 Malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem'^z - vd 202
- 204 **Le menteur ne va pas loin**
 Mensogo malproksimen ne kondukas^z - vd 146
- 205 **Le mieux est l'ennemi du bien (Voltero)**
 Pli bona - estas malamiko de bona^z
 Plibono estas malamiko de bono^z

- 206 **Mieux vaut aller au moulin qu'au médecin**
Mieux vaut aller au boulanger (au boucher) qu'au médecin
Mieux vaut aller à l'armoire (à la boulangère) qu'à
l'apothicaire Pli bone iri al la panisto, ol al la kuracisto
 Un évêque mort ne vaut pas un chien en vie
- 207 **Mieux vaut chien vivant que lion mort** (Evangelio)
 Hundo vivanta pli valoras ol mortinta leono
- 208 **Mieux vaut faire envie que pitié**
 Pli bone estas enviigi ol kompatigi^z
 Pli feliĉa estas martelo insultata ol amboso kompatata^z
- 209 **Mieux vaut peu que rien**
 Pli bona io ol nenio^z- vd 153 Pli valoras io ol nenio^z
- 210 **Mieux vaut prévenir que guérir**
 Pli facile estas malbonon eviti, ol korekti^z
- 211 **Mieux vaut promptement un oeuf que demain un boeuf**
 Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo^z- vd 360
- 212 **Mieux vaut tard que jamais**
 Pli bone malfrue, ol neniam^z
 Prokrastita ne estas perdita^z/forĵetita^z
- 213 **La montagne a accouché d'une souris**
 Monto gravediĝis, muso naskiĝis^z
 Granda nuboj, eta (malgranda) pluvo^z
- 214 **Les murs ont des oreilles**
 La muro havas orelojn^z
- 215 **Nécessité fait loi**
 Bezono estas plej forta ordono^z
 Bezono leĝon ne obeas
 Bezono sidas sur trono
 Kiu bezonas, tiu leĝon ne konas^z
 Se estas bezono ne estas rezono
 Neceseco leĝojn ne konas
- 216 **Ne crachez pas dans le puits, vous pouvez en boire l'eau**
 Ne kraĉu en puton, ĉar vi trinki bezonos^z



En abelujon ne blovu...

- 217 **Ne fais pas à autrui ce que tu ne voudrais pas qu'on te fît** (Tobio)
Ne faites pas aux autres ce que vous ne voulez pas qu'on vous fasse à vous même
 Al aliulo ne faru tion, kion ci ne volus, ke oni faru al ci - vd 116
- 218 **Ne parlez pas du loup, car il pourrait apparaître/surgir**
 Ne elvoku la lupon el la arbaro ^z
- 219 **Noël au balcon, Pâques aux tisons**
Noël au perron, Pâques aux tisons (regiono Poitou-Charentes)
A Noël les mouchérons, à Pâques les glaçons (dep. (Somme))
Qui à Noël cherche l'ombrier, à Pâques cherche le foyer (dep. Dordogne)
Qui prend le soleil à Noël, à Pâques se gèle (Aveyron)
Quand pour Noël on s'ensoleille, pour Pâques on brûle le bois
Noël au jeu, Pâques au feu (Hautes-Alpes)
A Pâques au coin du feu, à Noël à la porte
A Pâques au tison, à Noël au pignon
 Varma Kristnasko, malvarma Pasko
- 220 **Nous sommes tous égaux devant la mort**
Six pieds de terre suffisent au plus grand homme
 La morto ne distingas, ĉiujn egale atingas ^z
 Sub tero sklavo kaj sinjoro ne diferencas per valoro ^z
- 221 **La nuit porte conseil**
 Post dorma trankvilo venas bona konsilo ^z
 Post nokta ripozo helpas la muzo ^z
 Post bona dormo, konsila informo
 Dormo donas konsilon
- 222 **La nuit tous les chats sont gris**
 Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas ^z
 Nokte, eĉ monstro estas belulo ^z
 En mallumo plena, ĉiu estas Helena
- 223 **Nul n'est prophète en son pays**
 Neniu estas profeto en sia urbeto ^z
 Hejmaj sanktuloj ne faras miraklojn

- 224 **L'occasion fait le larron** (Cervantès)
Okazo faras (kreas, naskas) ŝteliston^Z
- 225 **Oeil pour oeil, dent pour dent** (Evangelio)
Okulon por okulo, denton pro dento^Z
Vundon pro vundo, kontuzon pro kontuzo^X
- 226 **Oignez vilain, il vous poindra; poignez vilain, il vous oindra**
Kisu malnoblulon, li vin batos. Batu, li vin flatos
- vd 280
- 227 **L'oisiveté est mère de tous les vices**
Senlaboreco estas patrino de ĉiuj malvirtoj^Z
Mallaboremo ĉiujn malvirtojn naskas
- 228 **On aime toujours ce qu'on n'a pas**
Nin ĉiam ravas, kion ni ne havas^Z
Fremda manĝo havas bonan guston^Z
Propra supo brogas, fremda allogas^Z
Bono posedata ne estas ŝatata^Z
- 229 **On a toujours à apprendre**
On apprend à tout âge
Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno^Z
En ĉiu aĝo devas kreski la saĝo^Z
Eĉ maljuna guru' ĉiam lernas plu
- 230 **On est large de l'argent d'autrui**
Pri havo najbara, oni estas malavara^Z
El fremda pota oni pagas facile^Z- vd 96
- 231 **On fait des folies à tout âge**
Eĉ en plej maljuna aĝo povas tute manki saĝo
Ne ĉiam per aĝo mezuriĝas la saĝo^Z
Ne ekzistas juneco sen kapricoj, nek maljuneco sen malicoj^Z
Pekas junuloj kaj pekaj maljunuloj^Z- vd 49
- 232 **On fait toujours le loup plus gros qu'il n'est**
Antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo^Z- vd 270
- 233 **On hasarde de perdre en voulant trop gagner** (Lafonteno)
De elekto tro multa plej malbona rezulto^Z
Kiu elektas tro multe ricevas nenion^Z

Kiu avidas plej bonan, perdas plej bezonan^z
Kiu multe profitas, ankaŭ perdon ne evitas^z
Kiu serĉas marcipanon perdas sian panon^z
Kiu tro multe deziras nenion akiras^z
Tro grandaj kalkuloj kondukas al nuloj^z

234 On juge aux actes

Koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago^z

**235 On n'apprend pas à un vieux singe à faire des grimaces
Ce n'est pas à un vieux singe qu'on apprend à faire
des grimaces**

Al kokino la ovo lecionojn ne donu^z
Ovo kokinon ne instruas^z
Lecionoj al profesoro estas vana laboro^z
Ne bezonas la kapo konsilon de kruroj^z
Ne prediku knabino al via patrino^z - vd 157

236 On n'a rien sans peine

vd 19

Nul bien sans peine

Pas de poisson sans arête

Kiu mem ne penas, nenio al li venas^z
Kiu volas panon, ne dorlotu la manon^z
Ne laciĝos la mano, ne fariĝos pano^z
Oni devas rompi nukson por havi kernon
Sen laboro ne venas oro^z
Sen lukto neniu frukto
Se vi ne penos, venko ne venos

237 On ne donne rien pour rien

Por nenio oni faras nenion^z

238 On ne fait pas d'omelettes sans casser d'oeufs

Nenia konstruo povas okazi sen bruo^z
Oni ne deŝiras rozojn sen pikvundo
Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo

239 L'on ne peut cacher aiguille en sac - vd 346

240 On ne peut contenter tout le monde et son père

(Lafonteno) Klopodi pri ĉies favoro estas pleje malsaĝa laboro

On ne saurait contenter tout le monde

Kontentigi ĉiujn eĉ anĝelo ne povas^z

- 241 **On ne peut pas être à la fois au four et au moulin**
On ne peut pas être à la foire et au moulin
On ne peut pas être aux champs et à la ville
 Oni ne povas sin movi laŭ ĉiu vento aparte ^Z
 Oni ne povas sonorigi kaj iri al la procesio
- 242 **On ne peut servir deux maîtres à la fois**
Nul ne peut servir deux maîtres (Evangelio)
 Al du sinjoroj samtempe oni servi ne povas ^Z
 Hundo gardanta du pordojn restos malsata ^Z
- 243 **On ne prête qu'aux riches**
 Nur posedantoj ricevas pruntmonon
- 244 **On ne sent pas la douleur d'autrui**
La mal d'autrui n'est que songe
 De fremda dento ni doloron ne sentas ^Z
- 245 **On n'est jaloux que de ceux qu'on aime**
 Amo kaj ĵaluzo estas gefratoj ^Z
- 246 **On n'est jamais si bien servi que par soi-même**
 Sia estas kara pli ol la najbara ^Z
- 247 **On n'est pas lous d'or**
 Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu ^Z
- 248 **On pend les petits voleurs et on laisse courir les grands**
 Ŝteteliston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas ^Z
- 249 **On prend (On attrape) plus de mouches avec du miel qu'avec du vinaigre**
 Pli allogas kulero da mielo, ol da vinagro barelo ^Z
 Kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas ^Z
 Por kapti ezokon, bongustigu la hokon ^Z
 Al kuko kaj kaso ĉiam venas amaso ^Z- vd 275
- 250 **On voit souvent la paille qui se trouve dans l'oeil du voisin, mais on ne voit pas la poutre qui se trouve dans le sien (Evangelio)**
Le bossu ne voit pas sa bosse, mais il voit celle de son confrère Kaldrono ridas pri pota kaj mem estas kota ^Z
 En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas ^Z
 En fremda tegmento li flikas truon kaj en propra ne vidas la fluon ^Z

Azen' al azeno riproças malsaĝon^z
Propran ĝibon neniŭ vidas^z
Ridas blindulo pri lamulo^z

- 251 **Où (il) y a de la gêne, (il n') y a pas de plaisir**
Kie estas ĝeno ne estas festeno
- 252 **Où la chèvre est attachée, il faut bien qu'elle broute**
Murmuregas la urso, sed danci ĝi devas^z
- 253 **Paris ne s'est pas fait (n'a pas été bâti) en un jour**
Rome ne fut pas faite en un jour
Ne en unu tago elkreskis Kartago^z
- 254 **Parler et faire font deux**
Un faiseur vaut mieux que cent diseurs
Paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj^z
- 255 **La parole est d'argent, le silence est d'or**^z
Parolo estas arĝento, oron similas silento^z - vd 134
- 256 **Les paroles s'envolent, les écrits restent**
Verba volant, scripta manent
La vortoj flugas, sed la pensoj sidas^z
Diron oni neas, skribo ne pereas^z
- 257 **Partir, c'est mourir un peu (Haraucourt)**
Foriri estas iomete morti
- 258 **Pas à pas, on va bien loin**
